



EKO 2021-16 sendita el Budapeŝto la 26an de aprilo. Kontrolo el La Chaux-de-Fonds.

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Nova kurso por hispanlingvanoj

Baldaŭ okazos la dua eldono de tre sukcesa iniciato, jam provita en pasinta somero: la virtuala kurso por hispanlingvanoj sub gvido de instruistoj, organizata de [Kolombia Esperanto-Ligo](#) (KEL). La pasinta kurso tre sukcesis ĉefe en Ameriko, kaj nun venos nova ŝanco. Hispana Esperanto-Federacio decidis kunlabori organize kaj finance en la kurso. Unu el la horaroj estos taŭga por lernantoj en Hispanio: merkrede kaj sabate inter la 19:00 kaj la 21:00, hispana horo (CEST).

La kurso konsistas el 16 sesioj de du horoj, po du semajne inter la 19a de majo kaj la 10a de julio. Sed la limdato por aliĝi estas **la 28a de aprilo!** Atentu ke la nombro de lernantoj estas limigita, do eble oni ne povos akcepti ĉiujn petantojn. La kurso estas senpaga por la lernantoj. La instruistoj ricevos etan kompenson, danke al la helpo de [HEF](#), [UEA](#) kaj [TEJO](#). Bv diskonigi inter viaj amikoj kaj konatoj, kaj ankaŭ kontaktu kun HEF kaze ke vi povas kontribui en la instruado.

Pliajn detalojn kaj aliĝilon eblas jam trovi en: <https://esperanto.co/cursos/c21/>.

El: BIT-bulteno 73 de HEF

Ekzamenaj rezultoj el Instituto Zamenhof

En tiu Togolanda lstituto, la dua trimestro de la lernojaro 2020-2021 komenciĝis februare kaj finiĝis aprile. Ĝi konsistis el 10 semajnoj, dum kiuj okazis kursoj kaj fine ekzamenoj, kies rezultoj sekvas. **Infanvartejo:** Estas 33 gelernantoj el kiuj 27 ekzameniĝis. Ĉiuj sukcesis, do 100% de sukceso. **Elementa nivelo**

En la komencaj kvar klasoj 159 lernantoj ekzameniĝis el kiuj ĉiuj sukcesis. La kvina klaso havas 33 gelernantojn, el kiuj sukcesis 31 gelernantoj, kio estas 93,93 %. - La procento de sukceso en la sesa klaso kun 35 gelernantoj estas 94,12 %, kio signifas, ke 32 el 34 ekzamenitoj sukcesis. **Duagrada nivelo (Kolegio):** Estas 60 gelernantoj en la unua klaso, kaj 59 ekzameniĝis. El ili sukcesis 47, (79,66 %) de sukceso. Ĉiuj 62 gelernantoj de la dua klaso ekzameniĝis, kaj 54 sukcesis (87,09 %). 55 gelernantoj de la tria klaso ekzameniĝis, kaj sukcesis 46 (83,63 %). La kvara klaso havas 56 gelernantojn el kiuj sukcesis 26, (46,42 %).

La lasta trimestro jam ekas en junio, kiam ekozos la ekzamenoj jarfinaj. La gelernantoj de la sesa klaso de la elementa nivelo kaj tiuj de la kvara klaso de duagrada nivelo trapasos ŝtatajn ekzamenojn. Apartaj preparlaboroj okazas por ili.



Francio komunikas

Lastatempe ni ne raportis pri eventoj en Espéranto-France. Jen du gravaj aferoj.

Okazis Printempa Festo la 20-an de marto. Parolis 17 intervenantoj, pri plej diversaj temoj : kulturaj eventoj, novaj agadoj kaj iniciatoj, ĉeestis centoj da partoprenantoj.

Aperis la longe atendata *Le Monde de l'Espéranto*, duobla numero, kun riĉa enhavo raportante pri agadoj en Francio kaj ankaŭ en la tuta mondo dum la pasintaj monatoj : Bunta Esperantujo. Rete legebla ĉe <esperanto-France.org>.

Claude Nourmont, Komitatano A por Francio

Israelo reiras al hibrida solvo

Post 13 monatoj da virtuala agado, la Tel-Aviva Esperanto klubo denove renkontiĝos fizike, en tutnova klubejo (domo Oazis, Herzl 75 Ramat Gan). Por tamen ne cedi niajn multajn novajn virtualajn partoprenantojn tutmonde, aliĝintajn dum la pandemia virtuala funkciado, ni provos okazigi la kunvenon hibride, helpe de granda ekrano en la kluba ĉambro. Aliro eblas tra la kutima retejo: <https://huji.zoom.us/j/7508982919>,

Ankaŭ alirebla de la hejmpaĝo de ELI: <http://esperanto.org.il/tel-avivo.html>.

Amri Wandel

'Infanoj ĉirkaŭ la mondo' kun nova gvidanto

Mi ĝojas raporti ke <<https://www.icxlm.org>>, la retejo de **Infanoj ĉirkaŭ la Mondo**, denove funkcias. Mi esperas ke la infanoj kiuj lernas Esperanton ankaŭ lernos kanti (finfine kune) "**La Kanton de la Koloroj**". Oni povas vidi la vortojn de la kanto kaj la koncernajn bildojn ĉe <<https://www.icxlm.org/koloro.pdf>>. Oni povas aŭdi la kanton ĉe <<https://www.youtube.com/watch?v=QmW06-FUqD4>>.

Mi nun havas 88 jarojn kaj ne plu volas vojaĝi al aliaj urboj aŭ aliaj landoj. Tial ankaŭ mi ne plu povas servi kiel Direktoro de la organizaĵo 'Infanoj ĉirkaŭ la Mondo.'

La nova Direktoro estas Charlotte BURTON <liquidfireangel@gmail.com> kiu loĝas en la usona ŝtato Teksaso. La retestro de nia retejo <<https://www.icxlm.org>> estas Enrique ELLEMBERG <enrike@aol.com> kiu loĝas en la usona ŝtato Kalifornio.

Ron GLOSSOP en Sankta-Luiso, Misurio, Usono apud la Misisipo (la rivero).

Admirantoj ĉirkaŭ la mondo

Kara Ronald,
dankon pro via zorgemo kaj dankon al la novaj helpantoj, kiuj plu servos por Infanoj ĉirkaŭ la Mondo! Mi ofte uzis tiun kanton kiel lernmaterialon

kaj miaj gelernantoj ĉiam tre ŝatis ĝin. Mi ĝojas, ke ĉio daŭre estos atingebla per interreto. Mi plusendos la informon al kelkaj korespondlistoj. Havu bonan sanon, restu optimisma, agadema por Esperanto!

Kun multaj salutoj, Zsafia Korody, Germanio

Por kontribuantoj al la EKO-komunikoj

EKO estas grava servo de UEA kaj ILEI. Atentu, ke la preparado por EKO rigoras – detektiveca serĉado de gravaj mankantaj informoj, serĉado de konvenaj bildoj kaj la lingva kontrolo. Alvenas multaj informoj kun tro tujaj limdatoj; tiujn ni kun bedaŭro devas prirezigni. EKO bezonas almenaŭ 12 tagojn da antaŭaverto pri alvenantaj limdatoj.

Ni ne havas formalan reton de kontribuantoj, sed kontribuoj ĉiam bonvenegas. Plejparte ni fiŝkaptas el la reto erojn, sed ofte ili ne maturas por tutmonda publiko. Ideale, ni volus ricevi maturajn tekstojn, inter 300 kaj 500-vortajn, prefere kun foto (reta kvalito sufiĉas). Ili estu verkitaj cele al tutmonda legantaro, kiu ne nepre konas viajn mallongigojn kaj lokajn konojn. Indas peni; via komuniko atingos pli ol dumil retadresojn!

Nuntempe mi havas materialojn por tri estontaj komunikoj. Se alvenas malmaturaj tekstoj, ili ricevas prokrastigon. Mi havas tekstojn, kiuj estis forŝovitaj tra ses komunikoj kaj fine malaperos pro malaktualeco. Sendu maturan tekston kaj ĝi ĝuos bonan ŝancon rapide aperi.

Stefan MacGill por la redakcio

===== vortoj: 910 =====

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de marto 2021 (per EKO 2021-12).. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

**Servo subtenata de
Universala
Esperanto-Asocio
kaj Internacia Ligo
de Esperantistaj
Instruistoj**



Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj
Mirejo Grosjean



ENHAVO

- Hispana kurso
- Togolando
- Israelo hibridas
- Infanoj (IĈLM)
- EKO-bleko.